

Ernst Anschütz,  
O Tannenbaum

Ernst Anschütz,  
Abio ho

Ernst Anschütz,  
Abio vi

*tradukita de Richard Schulz*

*tradukita de Paul Gottfried  
Christaller*

O Tannenbaum, o Tannenbaum,  
Wie treu sind deine Blätter!  
Du grünst nicht nur zur Sommerzeit,  
Nein auch im Winter, wenn es  
schneit.  
O Tannenbaum o Tannenbaum,  
Wie treu sind deine Blätter.

Abio, ho! Abio, ho!  
Vi estas tre fidela.  
Vi estas verda en somer',  
En vintro kaj en primaver'.  
Abio, ho! Abio, ho!  
Vi arbo tre fidela.

Abio vi, abio vi,  
kun foliar fidela!  
Vi verdas ne nur en somer',  
sed eĉ dum vintra neĝa ter'.<sup>2</sup>  
Abio vi, abio vi,  
kun foliar fidela!

O Tannenbaum, o Tannenbaum!  
Du kannst mir sehr gefallen!  
Wie oft hat nicht zur Weihnachtszeit  
Ein Baum von dir mich hoch erfreut!  
O Tannenbaum, o Tannenbaum,  
Du kannst mir sehr gefallen!

Abio, ho! Abio, ho!  
Vi multe al mi plachas!  
Vi estas ja Kristnaska  
ghoj',  
Vi arbo apud negha voj'!  
Abio, ho! Abio, ho!  
Vi multe al mi plachas!

Abio vi, abio vi,  
Al mi tre multe plaĉas.  
Ho, kiom ofte ĝojis mi  
en la kristnaska bril' be vi!  
Abio vi, abio vi,  
Al mi tre multe plaĉas.

O Tannenbaum, o Tannenbaum!  
Dein Kleid will mich was lehren:  
Die Hoffnung und Beständigkeit  
Gibt Trost und Kraft zu jeder Zeit.  
O Tannenbaum, o Tannenbaum!  
Das will dein Kleid mich lehren.

Abio, ho! Abio, ho!  
Min vi verdul' instruas:  
Ke konstantec', ke la esper'  
Konsolas nin en la mizer'.  
Abio, ho! Abio, ho!  
Min vi verdul' instruas.

Abio vi, abio vi,  
instruon donas bonan:  
Espero kaj la konstantec'  
konservas forton de junec'.  
Abio vi, abio vi,  
instruon donas bonan.

...

...

...

<sup>2</sup>aŭ:

sed eĉ dum vintra neĝ-veter'.

Tiun version de tiu ĉi linio mi, Manfred Retzlaff, iam aŭdis.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18).

Arg-593-1192 (2012-12-13 18:19:42)

Pri la verkinto Ernst Anschütz vidu ankaŭ la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst\\_Ansch%C3%BCtz](http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Ansch%C3%BCtz). Tie estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. La melodie estas aŭdebla en <http://www.youtube.com/watch?v=TlaRq509zKY>. La verkinto de la melodio ne estas konata. La muziknotoj troviĝas ekzemple en [http://www.lieder-archiv.de/o\\_tannenbaum-notenblatt\\_200078.html](http://www.lieder-archiv.de/o_tannenbaum-notenblatt_200078.html).

Traduko de la Germana poemo “O Tannenbaum” de ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-593-1193 (2013-02-26 15:10:12)

Tiu chi traduko aperis en 1982/12 en la n-ro 42 de la Vestfaliaj Flugfolioj eldonitaj de Rikardo Ŝulco (Richard Schulz). Tie estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).

Traduko de la Germana poemo “O Tannenbaum” de ERNST ANSCHÜTZ (\*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (\*1860-08-21 – †1950-12-31).

Arg-593-1455 (2012-12-13 18:37:04)

Tiu ĉi esperantigo de la kanto troviĝas en la retejo [http://kantaro.ikso.net/das\\_deutsche\\_lied\\_in\\_esperanto](http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto) sub [http://kantaro.ikso.net/abio\\_vi](http://kantaro.ikso.net/abio_vi). Ĝi aperis unuafoje en la kant-libro SSas e